

La Esperanto-Gironde Informilo



APRILIO 2020

N° 161

Stranga sperto, ĉu ne?



Karaj gelegantoj,

Ni esperas, ke ĉiuj el vi trapasas tiun strangan kaj malfacilan periodon sen san-problemoj por vi kaj viaj familianoj.

Tiu numero de via LEGI estas iom nekutima, pro la cirkonstancoj.

Nuntempe, la ĉefa vorto de nia ĉirkaŭaĵo estas «koronaviruso»¹, kaj tion spertas ankaŭ via revuo.

En tiu numero, vi povos legi, kiel kutime, raportojn pri la plej lastaj kunvenoj, kiujn ni sukcesis organizi, sed ankaŭ gravajn tekstojn pri la nuna situacio... kaj poemojn, pro la Printempo de la poetoj. Kaj ni memoru, ke aprilo estas ŝerca monato, kaj ankaŭ ŝercoj aperos tra la paĝoj.

Ne surpriziĝu, se vi trovas eĥojn de aliaj revuoj en ĉi numero: nu kelkaj kontribuantoj de LEGI ankaŭ kunlaboris en ekzemple *Sennaciulo* aŭ *LaKancerKliniko* rilate al tiuj aparta monda situacio...

Ni deziras al vi plezuratan legadon!

Tiuj el vi, kiuj ricevas la paperan version de LEGI bonvolu pardoni nin, se ĝi atingos vin pli malfrue ol antaŭvidite... pro la cirkonstancoj!

Janine kaj la redakta skipo

¹ Ĉar la nomo de la viruso ankoraŭ ne stabiligis en Esperanto, ni lasis ĉiun verkinton de la diversaj kontribuoj uzi la nomon, kiun li/ŝi taksas plej bona.



ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en PESSAC
la 9an de FEBRUARO 2020
je la 10a 30

Ceestas: Annie Brilleaud, Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Hélène Forget, Gloria Gargallo, Joël Lajus, Klodin' Pomiro, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie, Morine Stride, Bernard Vidal.

Senkulpigitaj: Christiane kaj Michel Jagueneau, Peio Labbé, Lucienne Laroche.

Elvezio salutas ĉiujn kaj dankas al Jean-Seb kaj Annie pro la gastigo. Hodiaŭ Jean-Seb festas sian 73an datrevenon. Li dankas al Janine pro la numero 160 de LEGI.

1/ Lingva festo

Ĝi okazos la 5an de marto en la universitato.

Baldaŭ okazos baloto por la estraro de la universitato. La estrino de la listo «Montaigne autrement» favoras al Esperanto.

2/ Informo

Koncerto de la Brassens-koruso en Bellegrave la 15an de februaro. La koruso festos sian 20an datrevenon. Ĉu ĝi estos interesata por kanti en Esperanto?

3/ Pri Germaine Gatard

Martine: Ĉeestis en la centjara festo kun Klodin', Marcelo kaj Monique. Estis tre emocia, varma festo. Marcelo parolis honore al Germaine. La urbestro ŝajnis interesata pri Esperanto, li eĉ demandis al Germaine, kiel oni diras «Au revoir». Ŝi estis tre kontenta pro la ĉeesto de anoj de Espéranto-Gironde. Poste ni iris al ŝia hejmo kaj vidis ŝian familion, tre simpatian. Esperanto Gironde donacis tri librojn kaj florojn.

Marcelo: En venonta LEGI aperos la fotoj, la parolado kaj la raporto de Marcelo. Ŝi tre bone fartas.

Bernard S: En Lormont ekzistas iu Rue de l'espéranto, dank' al ŝi.

Marcelo: La urbestro parolis pri Esperanto en sia parolado honore al Germaine.

Klodin' : Ŝi estas tre vigla, babilema, interesiĝas pri multaj aferoj. Ŝi daŭre povas legi, kaj ŝatas tion. Ŝi estas plu ŝercema.

Marcelo: Ŝia nura handikapo, estas, ke ŝi ne bone aŭdas. Ŝi havas lernolibrojn pri Esperanto kaj povas ilin donaci.

4/ Pri la Eŭropa tago de la lingvoj

Morine: A proposé au maire de Créon de participer à la Journée européenne des langues le 26 septembre. Le maire a donné son accord. La journée sera organisée avec les autres associations enseignant des langues. Il y aura une salle avec scène. La mairie prendra en charge la publicité, les affiches, ainsi que le café pour les bénévoles, le vin d'honneur, et un financement si nécessaire. La question est de savoir s'il sera toujours en exercice après les élections... Espéranto-Créon s'occupe de l'organisation de la journée. Seront impliquées des associations enseignant l'italien, l'anglais, la langue des signes, les TAP, l'Université du temps libre (pour le japonais). Les familles d'origine étrangère seront intéressées.

Espéranto-Créon cherche une ville en Italie, en Espagne ou en Allemagne où il y aurait des espérantistes, pour échanger.

Morine est allée à Grésillon mais n'a pas pu aller jusqu'au bout du stage. Participera au stage de février à Bouresse.

Gloria: A retrouvé un cahier de l'Union rationaliste de 1961, avec un article d'André Caubel.

Marcelo: Li estis eminenta membro de SAT Amikaro. Liaj gefiloj, Jacques kaj Renata (Chassard) parolis esperante hejme, kiam ili estis infanoj. Ili daŭrigis.

Jean-Seb: La komitato de ĉi kvartalo (Magonty) organizas ĉiusemajnajn kunvenojn por maljunuloj. Li prezentos Esperanton al la ĉeestantoj okaze de unu el la kunvenoj kaj projekcios la filmon de Gautier.



Marcelo: En la numero de *Sennacia revuo* aperos frontpaĝe la artikolo pri presdesegnoj. Tiu artikolo estos printita por Esperanto-Gironde. Pri ĝi estis vigla interŝanĝo inter la korektantoj, precipe kun Rikardo Schneider, ĉar en la artikolo aperas frontpaĝa desegno de LKK. Rikardo kvazaŭ ĉantaĝis, se la desegno aperus, li formetigus sian nomon el la kolofono. Serge Sire vigle reagis: temas pri artikolo pri cenzuro, kaj kelkaj cenzuras sin mem! Finfine post diskuto la bildo aperis, Rikardo mildiĝis.

Klodin' : La interŝanĝo montris, ke desegno devas esti rigardata laŭ ĝia kunteksto.

Elvezio: Pri la recenzo de Brel-KD fare de rusa Esperantisto en *La Ondo de Esperanto*: Ni aperigu ĝin en LEGI, kun la reago de Mari-Elen' .

Marcelo: Ni devas montri, ke ni estas reagemaj. Brel mem kaj nia KD ne estas kompareblaj. Tamen la recenzisto entute pravas en siaj kritikoj.

5/ Pri Brassens

Marcelo sendis al diversaj retadreso komunikadon por alvoko al partopreno en la kolektado de la tradukoj. Véronique Girard, kiu prizorgas la retejon de SAT-Amikaro, enŝovis la alvokon kaj enŝovos la liston de la kanzonoj. Ŝi kreis spacon por la vivo de la lokaj grupoj. Espéranto-Gironde estas unu el ili. Do ni sendu informojn aŭ eĉ LEGI-on, por ke ŝi aperigu informojn sur la retejo.

Morine proponas, ke ni sendu informojn al Espéranto-Info.

Yannick proponas, ke la projekto aperu sur la retejo de La Kompanoj. Cetere oni devas enŝovi la tekstojn de Brel kaj la ligojn al Vinilkosmo.

Morine: La Kompanoj povus partopreni en la Eŭropa tago de la lingvoj. Do ni kontaktu tiujn, kiuj partoprenis en la Lilla projekto.

Marcelo: Bernard kaj Betty Legeay venos fine de marto por poluri la jam ekzistantajn tradukojn.

Morine envoie à Espéranto-Gironde le clip *Protégeons demain* d'Anny Duperey et Annabelle sur les langues.

Elvezio conseille le clip de Sylvain Lelarge sur les corrélatifs.

Jean-Seb demande si on pourrait inventer une comptine sur les corrélatifs.

Morine nous passe la vidéo de Mio, jeune Suédois qui parle espéranto (vidéo passée sur ARTE).

6/ Pri la blogo

Bernard V.: Neniu sendas informojn por nutri la blogon. Kiam eblas, ni sendu fotojn kaj artikoletojn al la adreso bmvidal@gmail.com (tel: 06 95 02 85 00).

La kunveno finiĝas je la 12a 45.



Dum la posttagmezo, ni partoprenas en la ateliero pri traduko de la kanzonoj de Brassens.

Marcelo montras la du versiojn de *La Pluvombrelo*: unua versio de Marcelo kaj Bernard Legeay, kiun Jacques Yvart devis registri. Do li iris al Bouresse por trejniĝi kun Georges Lagrange pri prononcado, kaj Geoges enigis modifojn. Tiu modifita versio estis registrita.



Pri *Heureux qui comme Ulysse*: **Marcelo** prezentas la cirkonstancojn de la registrado de la kanzono (de Henri Colpi kaj Georges Delerue) far Brassens.

Tiu ĉi kanzono estas unu el la tri, kiun Brassens registris, estante nek aŭtoro, nek komponisto. Henri Colpi, la aŭtoro de la filmo kaj de la kanzono estis infanaĝa amiko de Brassens en Sète.



Post resumo de la filmo, ni komencas proponi tradukojn por la unuaj versioj.

Por plej ĝuste traduki, necesas la partituro, ĉar oni nepre respektu la ritmon kaj la takton.

Cetere la kanzono aperas tri fojojn en la filmo, unu en la prezento-listo, kaj du fojojn dum la filmo mem... kaj la vortoj ne estas la samaj en la tri aperoj... Ni tradukos la version, kiu estis registrita sur disko. Ni povos aldoni la tradukojn de la aldonaj strofoj kaj komentojn.

Ni traduku unue laŭvorte, ĵetu la plej gravajn vortojn. Ekz. «traversée» rilatas al ideo de migrado.

Ni konservu kiel eble plej ofte la saman skemon de la rimoj, sed oni povas ŝanĝi, laŭ kiel prezentiga la okazo.

Trafaj trovaĵoj:	voyage	-> vojaĝo
	paysage	-> pejzaĝo
	vertes années	-> infanaĝo

Takto: vv_v_vv_ (v = neakcentita silabo / mallonga; _ = akcentita / longa)

Ni ne havas la tempon iri pli antaŭen en la traduko.

La venonta kunveno okazos la 8an de marto en Cenon Palmer.

Janine

CENTJARIĜO DE GERMAINE GATARD

(22an de januaro 2020 en Lormont)

100jara petolema Germaine

Neniun Germaine kapablus konvinki, ke ŝi estas 100jara, se ŝia legitimilo ne tion atestus sub niaj okuloj. Ja ŝia tiel vigla menso briligas la okulojn, asertigas voĉon per nehaltigebla fluo de vortoj, kaj daŭre vivtenas ŝian belan spriton.

Vi rajtas rebati, ke Germaine de longaj jaroj ne plu povas viziti nian grupon pro irproblemoj. Vi pravas. Sida tenas ŝin rulseĝo, kaj kvankam ŝi estas la membro de Espéranto-Gironde, kiu loĝas plej proksime de nia sidejo, tiu handikapo malebligas al ŝi viziti nin. Kontraŭvole, kedu min, ĉar Germaine daŭre ŝatas homkontaktojn kaj fieras pro sia esperantismo. La invito de la urbodomo de Lormont al festeto okaze de ŝia 100a datreveno estis por ŝi okazo tion denove publike montri. Kaj por kelkaj el ni, Monique, Gloria kaj mi, ĝi estis okazo retrovi nian amikindon ekzakte sama kiel ni lastfoje vidis ŝin antaŭ... tro da jaroj. Klodin' memoras, ke ŝi alvenis en la grupo ĝuste en la tempo, kiam Germaine pli maloftigis siajn vizitojn. Kaj Martine, kiu ĝis tiu tago nur pertelefone aŭ skribe kontaktis Germaine, finfine malkovris la rideman vizaĝon kaj la bonan humuron de la heroino de la tago.

Neniul ni rajtis maltrafi la rendezuon, kiun pertelefone anoncis al Monique kaj Klodin' Jean-Claude, la okdekjara filo de Germaine. Neniul mi povis rifuzi al Germaine ŝian «grandan servon», kiun ŝi postulis la vesperon ĵus antaŭ la evento: « Tu voudras bien dire quelques mots pour moi demain. Tu comprends moi je suis trop bouleversée. Je n'y arriverai pas. Toi, tu as l'habitude de parler devant la foule. Juste quelques mots pour remercier et dire mon attachement à l'Espéranto. Parce que tu comprends, c'est important ! Il y en a beaucoup, qui n'en ont pas du tout entendu parler. Alors je compte sur toi, parce que toi tu sais. J'ai confiance. (...) ».

Kaj efektive, Germaine estis ekscitita merkredon la 22an de januaro, kiam ni retroviĝis en la maljunula centro *Victor Hugo* en la kvartalo *Les Lauriers* de Lormont. Bele pretigite, ŝi sune radiis tra la ĉambro. Ŝin akompanis gefiloj, genepoj kaj pragenepoj. Kun S-ro Jean Touzeau, la urbestro de Lormont, ankaŭ pluraj membroj de la urbestro, kaj ĉiuj kolegoj de la socia fako de la urbodomo (CCAS) partoprenis en tiu oficiala omaĝo. Komprenoble en tempo de kampanjo por la martaj balotoj, dum sia parolado la urbestro laŭdis sian skipon, sian laboron, sin mem, kaj evidentigis la agadojn favore al la maljunaj personoj en la urbo. Tamen transpreninte la kelklinian noton pri Germaine, kiun li komence eklegis, li ne stumblis sur la vorto Esperanto. Male. Li tiam lasis sian paperon kaj bone klarigis al la publiko, kio estas tiu internacia lingvo, ĝiaj celoj kaj idealo. Li ankaŭ esprimis sian sinceran bedaŭron, ke ĝia sukceso, kiun atendis homoj el ĉia generacio ne venis.

Li tiam petis de Germaine kelkajn vortojn en Esperanto. Ŝi simple diris «Mi bondeziras al vi feliĉan jaron 2020!» kaj la mikrofono estis al mi transdonita por kelkaj pliaj vortoj. La legonto trovos ilin sur alia paĝo de tiu LEGI. Simple sciu vi, ke tiuj simplaj kelkaj vortoj estis varme aplaŭditaj de la tuta ĉeestantaro, kaj ankaŭ tio emociigis ravitan Germaine. Ĝus alveninte mi proponis al ŝi: «Germaine, ĉu ci deziras, ke mi legu al ci, kion mi preparis por eldiri cianome? – Tute ne! Mi fidas al ci! Estos surprizo.» Nu, videble temis pri bona surprizo.

Ĉar ŝi trovis fabon en sia reĝkuka peco, Germaine ricevis kronon sur la kapon. Tiam ŝi plej konvinke aldiris al la urbestro «Maintenant, c'est moi la reine de Lormont!»

Agrabla surprizo ankaŭ estis por Martine, Klodin' kaj mi, la posta tre bonkora familia akcepto en la hejmo de Germaine. En sian malgrandan, teretaĝan loĝejon, Germaine venigis nin por daŭrigi tiun feston. Sian feston. Bedaŭrinde Monique pro la fora distanco devis rehejmiĝi, en la notka aŭtado ankaŭ Gloria-n ni perdis survoje. Sed hejme Germaine plu brilis, petolis, eĉ trinketis ĉampanon. Ĉu 100jara nia Germaine? Lasu min plu dubi kaj esperi trovi liberan horon de tempo al tempo por plu viziti ŝin. Ankoraŭ longtempe!

Sincere admiranta Marcelo



Centjara Germaine, reĝino de la festo!



**PAROLADO NOME DE GERMAINE GATARD DUM LA OFICIALA CEREMONIO
OKAZE DE ŜIA CENTJARIĜO
EN LA MALJUNULEJO *LES LAURIERS (LA LAŬROJ)* EN LORMONT.**

Sinjoro Urbestro, gesinjoroj, *Monsieur le Maire, Mesdames et Messieurs*, laŭ peto de nia amikino Germaine Gatard, centjara post kvin tagoj, *à la demande de notre amie Germaine Gatard, qui sera centenaire dans cinq jours*, mi diros al vi, ŝianome, kelkajn vortojn en Esperanto: *je vais vous dire en son nom quelques mots en espéranto* :

Unue koran dankon pro tiu omaĝo, kiu honorigas min hodiaŭ. *Tout d'abord, grand merci pour cet hommage, qui m'honore aujourd'hui*. Pro tro forta emocio, vi komprenu, ke mia menso ne sufiĉe klaras por mem eldiri tiujn vortojn en Esperanto, *En raison d'une trop forte émotion, vous comprendrez que mon esprit n'est pas assez clair pour que je puisse dire moi-même ces mots en espéranto*, en tiu lingvo, kiun mi tiel ŝatas. *L'espéranto, cette langue que j'aime tant*. Kun tiu lingvo mi trovis idealon pri paca mondo, pri monda paco. *Avec cette langue j'ai trouvé l'idéal d'un monde pacifique, de la paix mondiale*. Per tiu lingvo mi korespondis kun geamikoj en diversaj landoj *Au moyen de cette langue j'ai correspondu avec des amis dans divers pays*, egalece interŝanĝis vidpunktojn pri ĉiutaga vivo sed ankaŭ plej korajn sentojn. *D'égal à égal échanger des points de vue sur notre vie de tous les jours mais aussi des sentiments les plus cordiaux*. Dank' al tiu lingvo mi nodis fortajn amikajn ligojn. *Grâce à cette langue j'ai noué des liens d'amitié très forts*.

Al knabineto, kiu iam demandis min: *A une petite fille qui un jour me demandait : « kiel oni fariĝas maljuna? » « comment on devient vieille ? »* mi simple respondis *j'ai simplement répondu « sufiĉas longtempe vivadi » « il suffit de vivre longtemps »*. Do, Sinjoro Urbestro, gesinjoroj, *donc, Monsieur le Maire, Mesdames et Messieurs*, fine mi bondeziras feliĉan jaron 2020, *pour finir je vous présente mes vœux pour une heureuse année 2020*, kaj, ĉar Esperanto estas lingvo de tiu, kiu esperas, *et parce que l'Espéranto est la langue de celui qui espère*, mi proponas, ke ni jam ren-devuu ĉi tie post 10 jaroj okaze de nova naskiĝfestoj *je vous propose, que nous nous donnions rendez-vous ici dans 10 ans pour une prochaine fête d'anniversaire*.

Dankon pro via aŭskulto. *Merci pour votre écoute*.

Germaine (1989)



**Merkredon la 22an de januaro 2020, la urbestro de Lormont,
okaze de bondeziroj en maljunulejo
honoris samtempe du centjarulinojn, inter kiuj, Germaine.**

Nome de E-G, ĉeestis Gloria, Martine, Monique, Marcelo kaj mi. Mi ne havis okazon ofte renkonti Germaine-n antaŭe ĉar ŝi ĉesis partopreni la renkontojn en la grupo E-G pro malfacila moviĝo, ĵus kiam mi mem komencis tien veni. Kiam ŝi eniris la salonon de la maljunulejo, mi tuj rekonis ŝin; ŝi daŭre estas kiel sur fotoj, kiujn ni havas; ŝia vizaĝo ne ŝanĝiĝis kaj malfacilas pensi, ke ŝi estas centjaraĝa.

La ceremonio de la urbestro estis ne tro solena, kaj ekis per simpatia kaj originala malfermo de la vicurbestrino, kiu surprizis ĉiujn legante kaj legigante citaĵojn el tagĵurnaloj de diversaj personoj, famaj aŭ ne, celante al kono de aktualaj atelieroj pri verko kun la rezidantoj. Tuj, bonkarakterata etoso distris la ĉeestantojn, kaj Germaine, tre atentema, aŭskultis kun intereso. Ŝia vizaĝo spegulis ŝian plezuron dum la tuta posttagmezo.

Poste ni estis invititaj iri ankaŭ plu renkonti Germaine-n en ŝia domo. Neatendita invito, al kiu ni jesis. Ni sekvis nin, unu la aliajn aŭte. Sed nokte sub pluvo kaj meze de vespera trafiko, en kvartaloj nekonataj de ni, ni perdis el la okuloj Gloria-n, kaj iom ronde iris antaŭ ol atingi la taŭgan adreson.

Germaine montris sin vivema, parolfluema, kun humuro aktive partoprenis la konversacion, kiun ŝi mem animis. Ŝi eĉ aludis la nunan etoson en Francio, bedaŭris la estontecon, kiun la registaro pretigas. Ŝi ankaŭ bedaŭris ne plu flue paroli Esperanton pro tro longa tempo sen trejnado. Tamen foje kelkaj vortoj revenis en ŝian memoron kaj ŝi ĝuis pro tio.

Ni timis lacigi ŝin sed male ŝi montris sin plene bonfarta. Nur la rulseĝo bremsas ŝian impeton, fizike.

Unuvorte, admirinda Germaine, se oni ne asertus tion, ni ne kredus, ke ŝi estas centjaraĝa kaj ni bondeziras, ke ŝi dumvive konservos tian mensviglecon.

Klodin'



Germaine en Sète (1990)



Germaine en Amboise (1990)

Germaine aliris al Espéranto Gironde en 1989, la saman jaron kiel mi. En tiu epoko ni multe, kaj serioze, laboris dum la kursoj en Cenon Palmer. Fakte Leo kaj Henriko gvidis niajn studojn. Agrabla laboro, kiam ni lernis skeĉojn, kiujn ni deklamis dum renkontoj, festetoj...

Ŝi tiel partoprenis en ĉiuj spektakloj donitaj en Ĝirondio kaj ekstere, kiel Amboise en 1990 kun la teatraĵo *Oĉjo Georges*. Tiukaze ŝi kudris la blankan robon, kiun mi surmetis por mia rolo de «Padilla del Sol». Kiun rolon ŝi mem ludis? Bedaŭrinde mi, kaj ŝi, ne plu memoras. Tamen ŝi havas en memoro la rolon de gardistino de meleagroj, eble unu virino de la vilaĝo en la kanto *Brave Margot!* La saman jaron, ŝi partoprenis en staĝo en Sète; en 1993 ĉe nia ĝemeligita urbo Vitoria, en la vaska lando; ŝi ludis skeĉon por la Jubileo en 1994, ktp... Mi certe forgesas plurajn aliajn eventojn...

Dum niaj ĝirondiaj kongresoj, ŝi aktivis per trikaĵoj kiel lanŝuoj, ĉapeletoj...

De tiam ŝi restis fidela al la lingvo, same kiel al Espéranto-Gironde. Ŝi daŭrigas la legadon de Esperantaj gazetoj, kiel nia LEGI, Espéranto-Infos. Kaj antaŭ ne longe ŝi skribe korespondis kun Rudy, germana amiko.

Dum pluraj jaroj ŝi partoprenis, kun Louise kaj Ŝeline en kunvenoj, ĉu en St André de Cubzac, ĉu en Carbon Blanc, kelkfoje kun Henriko, laborante ĉiam agrable, manĝante, trinkante...

Kiam ŝi ne plu povis veni en Cenon mi de tempo al tempo, sed ne sufiĉe ofte, vizitis ŝin hejme, post nia lunda kurso. Je la 17a horo atendis min Germaine, teo, kuketoj kaj babilado... Pro mia translokiĝo mi ne plu vizitas ŝin, sed tamen ni regule telefone babilas.

Mi ĝojas, ke ŝi atingas sian 100an jaron kun la ideoj tute klaraj en la kapo, kio permesas al ŝi daŭre interesiĝi pri la Esperanta movado, pri la mondnovaĵoj, eĉ pri la politikaj aferoj...

Rendevuo estas prenita por aliaj datrevenoj...

Tutamikajn kisojn, Germaine.

Monique



Germaine en Carbon Blanc (1995)

«HAZARDO TRAFE AGAS»

Antaŭ kelkaj tagoj, mi ricevis leteron senditan de mia poremerita organizo proponantan al mi partoprenon en posttagmeza distraĵo en Gornac, vilaĝeto proksima al Cadillac. La programo precizigis, ke junaj geaktoroj prezentos skeĉojn kun la helpo de la publiko.

Scivolema, mi decidis iri ĝis Gornac!

La spektaklo okazis en festa salono sufiĉe granda tamen kun scenejo, ruĝa kurteno, kulisoj kiel malgranda teatro. Proksimume 100 personoj iom post iom alvenis, sidiĝis kaj pacience atendis, ke la spektaklo komenciĝu.

Mi rimarkis, ke tri junaj aktoroj estis jam en la salono, la du virinoj vestitaj laŭ originala maniero kaj la viro pli simple. Ili promenis dekstre kaj maldekstre, parolante al diversaj personoj per mallaŭta voĉo.

Subite, la juna viro venis ĉe mi kaj min demandis, ĉu li povas paroli kun mi. Mi konsentis kaj li sidiĝis sur la libera seĝo apud mi. Afable, li petis, ke mi rakontu, kion mi faras dum mia libera tempo. Do mi priskribis al kio mi dediĉas mian tempon: sporto, ĝardeno, promenado kaj vojaĝo al Hispanujo, lernado de lingvoj: la hispana kaj la Esperanta. Li, ege surprizite, petis klarigojn pri Esperanto kaj li foriris ĝis la kulisoj trovi la aliajn aktorojn. Post nur kelkaj minutoj, ili revenis sur la scenejon kaj mimis, helpite de nemultaj rekvizitoj, kaj kun vera talento, la konversaciojn, kiujn ili havis kun la personoj (nur virinoj) de la publiko. La unua rakontis siajn ĝojojn kaj problemojn, kiam ŝi prizorgas siajn genepojn (*Chic*, la infanoj alvenas, *Ouf*, ili foriras!); alia, kiu estis urbestro de Gornac dum multaj jaroj, rakontis, kiamaniere ŝi solvis la problemojn inter la najbaroj, antaŭ ol ili interbatalos! ktp.

Kiam mia vico alvenis, ili tre precize mimis, kion mi konfidis al la aktoro. Helpate de tri taburetoj, ili bildigis veturilon, en kiu tri amikoj vojaĝas ĝis Hispanujo, legante libron, kiun mi verkis! Kaj, laŭvoĉe, li demandis al la publiko: «Kiu parolas Esperanton?» Mi aŭdis en la salono kelkajn surprizitajn murmurojn. Kompreneble, mi respondis kaj diris unu frazon en Esperanto kaj tradukis ĝin. La aktoro faris al mi alian mallongan demandon: «Ĉu vi opinias, ke Esperanto anstataŭos la anglan?» , al kiu mi respondis laŭ mia pensmaniero kaj la publiko aplaŭdis. Poste la spektaklo finiĝis.

Tiu «aventuro» ne estis atendita de mi! Sed mi pensis, revenante hejmen kaj admirate la belegan kampanon pejzaĝon, ke pli ol cent personoj, hazarde, aŭdis paroli pri Esperanto kaj en Esperanto dum posttagmeza festo.

Kiel diras francoj: «Hazardo trafe agas»!

Gloria, la 26an de januaro 2020

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en CENON PALMER
la 8an de MARTO 2020
je la 10a 30

Ceestas: Annie Brilleaud, Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, H el ene Forget, Klodin' Pomiro, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie.

Senkulpigitaj: Christiane kaj Michel Jagueneau, Gloria Gargallo, Jo el Lajus, Lucienne Laroche, Morine Stride.

Elvezio:

1/ Nova oj pri la lingvofesto

La lingvofesto estas nuligita pro la viruso. Estas doma e,  ar Cl ment povus  eesti. Elvezio lin renkontos. Nun Cl ment laboras  e UEA kun aliaj volontuloj, instruas Esperanton. Li laboras en la libroservo (duontempa laboro); lia lo ejo estas pagita de UEA. Li eble partoprenos en la Montreala kongreso.

2/ Baloto en la universitato

La rezulto estos donita la 25an de marto.

3/ Libourne

La projekciado okazos sabaton la 18an de aprilo je la 17a. Elvezio  eestos kaj invitas nin la eble  eesti.



4/ Cr on

La 26an de septembro: E ropa tago de la lingvoj. Morine proponas surstratan kunkantadon je tiu okaza o.

5/ SEMEO en Tuluzo

 i okazos venontan semajnon. Vendredon, okazos koncerto de Chiara Raggi. Okazos en Amiens prelego de Istvan Ertl pri Jules Verne kaj Esperanto. Elvezio intencas lin inviti venontjare en la universitaton.

Elvezio proponas kontra knalon: «Hodia  ne okazos virina koruso pro koronaviruso.»

Klodin' ricevis nova ojn de Trigo (S-ro Peng),  ina esperantisto de Wuhan. Neniu kazo de malsano en lia  irka a o, sed  iu en la urbo estas enfermita (vd p.25). Unu filino lia lo as en Tuluzo.

Marcelo: Wuhan estas ĝemelurbo de Bordoza. Marcelo kaj Klodin' ekkonis lin en la jaroj 2000, kiam grupo da loĝantoj de Wuhan venis por viziti Francion. Ili konatiĝis en Pluezek.

Martine: Estas 26 aliĝantoj por 2020.

* Forigi la adreson de Kribo el la listo por papera sendado. Same por Michel Lavergne. Same por Jeanne-Marie Cash: sendi al ŝi LEGI perrete.

Ankaŭ perrete al Aŭrora, Morine kaj Peio, Karima.


Marcelo komencis skani la malnovajn numerojn de LEGI (ekde la unua) kaj la broŝurojn de SAT. Li ĝis nun skanis 105 broŝurojn, el kiuj 46 estas rete alireblaj. Li skanas, kaj sendas al Ivan Garcia, kiu kontrolas la skanadon, reĝustigas, traktas la dokumenton, tiel ke oni povas fari serĉojn per vortoj.

La posta paŝo estos la transpreno de la tuto far Ana Manero, kiu laboras en la Nacia biblioteko de Hispanio, kaj enigis ilin en la katalogon.

Marcelo: Partopreno en *Sennacieca Revuo*; el la artikolo publikigita li preparos broŝuron. Li aldonis desegnaĵojn kaj la perreta diskuto, kiu okazis inter la redaktantoj de la revuo, kaj ankaŭ la tradukon de kelkaj tekstoj el la poŝlibro *Nous sommes Charlie*.

Elvezio: Clément donacas revuojn *Kontakto* kaj *Esperanto*.

Marcelo: Ricevis leteron el norda Francio de Jacques Yvart, kiu publikigis romanon *L'Histoire peu banale d'Ivan Loubli*. Li jam antaŭ kelkaj jaroj publikigis novelaron *L'Huître et autres nouvelles*, kaj detektivromanon *Fromage à Bergues*. Brassens aligis Jacques Yvart al la SACEM, kaj kantis poemon de Norve laŭ muziko de Jacques Yvart.



Marcelo: Brassens-Projekto:

Pluraj kunlaboras por plibonigo de tekstoj; ekz. pri *Saturne*, tradukita de Silĉjo (Sylvain Barrier), kunlaboras Marcelo, Janine, Serge Sire.

Nun estas 58 kanzonoj tradukitaj, kaj 65 versioj. La celo estis 60; tion oni povos facile atingi.

Cetere li parolis kun Dany Dutheil, bofilino de Michel Lavergne. Ŝi laboras ĉe la eldonejo Editions du Halage kaj favoras partopreni en la eldono de la libro, se ĝi estos dulingva. Ŝi pretas veni en septembro aŭ oktobro, por doni sian vidpunkton kiel eldonisto.

La tekstoj estos poluritaj en la 2a parto de la projekto (2a sesmonato de 2020).

Demandoj: ĉu ni enŝovos nur kanzonojn aŭ ankaŭ prezento-tekstojn? Kiom longajn? Kien meti ilin?



Martine zorgos pri kontakto kun SACEM kaj poste la Brassens-muzeon de Sète.

Post la manĝo, kiel kutime abunda kaj bongusta, ni festas la Printempon de la poetoj (vidu p.17 kaj sekv.)

Janine legas du mallongajn poemojn de Armand Su: *La bonkora faraono* kaj *Sendoma kato*. **Bernardo**, ĉar la ĉijara temo estas la kuraĝo, legas la tradukon de *Se...*, poemo de Ki-

pling, tradukita en 1918 de L.A. kaj B.E Long.

Elvezio legas poemon pri kuraĝo, kiun li mem tradukis, de Daniele Corbo, itala psikiatro.

Jean-Seb verkis humuran-amaran poemeton pri «kur-aĝo».

Marcelo trovis poemon de Frederi Mistral, *Poemo de la Rodano* (tradukita de Valo – Raymond Laval), kiu entenas parton pri kuraĝo.

Aliaj kuraĝaj poetoj: Omar Kajam (11a-12a jarcento), tradukita de Waringhien; Norbert Bartelmes (1897-1987), juna germana esperantisto, kiu sin turnis al Lantiideoj en 1938. Li estis oficisto en SAT-sidejo; redaktisto de *Sennaciulo* kaj *Sennacieca revuo*. Li estis malliberigita en koncentrejo. Depost la milito, li vivis en Parizo, en ruldomo kun piano kiel nura meblo.

Marcelo legas la poemon *Beethoven*.


Klodin' legas la poemon *La studanto*.

Marcelo legas *Por la 15a de decembro* verkita en 1958.

La posttagmezo finiĝas per kanto de l' kuraĝo: *La fluanta tajdo*, laŭ irlanda popolkanto, tradukita de Harrison Hill.

La venonta kunveno devus okazi la 5an de aprilo en Palmer.

Janine



Kantu, kantu, kamarado,
Gloran estontecon havos vi :
Estas hela la ĉiel',
Ĉiam brilos nia stel',
La fluanta tajdo estas nun ĉe ni.

DEVIGA HEJMRESTADO

Ve! La kunveno ne okazis la 5an de aprilo, ĉar ĉiuj devis resti hejme!
Ĝuu kelkajn rakontojn pri tiu deviga izoligo...

RAKONTETO PRI DEVIGA IZOLIĜO (1)

En manĝoĉambro, aŭ vivĉambro, aŭ iu ajn neŭtrala ĉambro de apartamento.

A kaj **B** (paro da geedzoj, aŭ gejedzoj aŭ gejedzinoj...) sidas, **A** legas ĵurnalon, **B** atente spektas la ekranon de iu komputilo...

A stariĝas, etendas la brakojn, iom gimnastike ekzerciĝas.

B okulangule indiferece rigardas al **A**.

A malproksimiĝas al la pordo de la ĉambro.

B rigardas al **A**: Kien vi iras?

A turniĝas al **B**: Mi iras por promenadi al la fundo de la koridoro.

B: Bone! Je l' reveno, ĉu vi bonvolos halti je la koridorŝranko kaj alporti skatolon da verdaj pizoj, mi petas?

RAKONTETO PRI DEVIGA IZOLIĜO (2)

A kaj **B** en la kuirejo, sidante ĉe matenmanĝa tablo. **A** surhavas negliĝon, **B** estas jam vestita per trejnokostumo.

A: Nu, vi ellitiĝis vere frue, ĉi matene, ĉu ne? Kion vi faris?

B: Mi bezonis iom sportumi. Do mi kuretis de la dormoĉambro al la koridoro, kaj de la koridoro al la skriboĉambro, de la skriboĉambro al la salono, poste de la salono al la manĝoĉambro... kaj finfine de la manĝoĉambro al la kuirejo! Uf!

A: Ha! Admirinde! Kaj kiujn vi renkontis?

Janine



LA PRINTEMPO DE L' POETOJ

NORBERT BARTELMES

La studanto

La lampo dubmalforte lumas,
La forno flave, rampe fumas,
Ĉe tablo sidas mi krudligna,
Ribelas kontraŭ vok' indigna:
- Skribu, skribu!

La libroj amasiĝas tie,
Grizaĉaj, flavaj pergamenoj;
Malmultaj nur da helmienaj.
Sin trudas ili, premas, gestas,
Dum kline mi ĉe l' tablo restas:
- Skribu, skribu!

La manoj krispas spasme, nerve,
La lip' prononcas sonojn verve.
Mi literumas vortserion,
Mi parkerumas, aŭtomate,
Kaj subaŝkultas raŭkan krion:
- Skribu, skribu!



N. Bartelmes

De ink' malsekas la paperon,
La plumo skrapas sen fiero;
Peziĝas man', tumultas kapo,
Kaj skandas super mia kapo:
- Skribu, skribu!



Beethoven

Rifoj pugnis kontraŭ mia pordo
Krudmora vir'. Trifoje krevis kordo
Sur mia instrument'.
Laŭ kia leĝo, - sakrament'! -
Rezistis la martelon pord',
Dum saltis kord' kvazaŭ risort'?!
Pluver' glaciigis stalaktite
Sur febra frunto mordita de l' splen',
Violonĉel' ĝemis intermite,
Veis la basoj pro surda ĉagren'.
Vento kaptiĝis en torda harar',
Mire pro tiom da kontraŭstar'.

Flutoj, hobojoj disŝiris l'aeron,
Kornoj fanfaris por ĉasi ĥimieron.
Lacegas la korp' kaj surdiĝas orel'.
Sed frapas amboson senĉese martel'.
Kaj la ritmo eksaltas, peliĝas en tromb',
Svingiĝas senfinen, transnuba balon'.
Ĝis ĉio eksplodas kiel ŝpruca bomb',
Sub kupra enfal' sin estingas violon'.
Nenia ripozo, nenia silent' -
La frunto levita al firmament',
Libera titan' kun vidanta okul',
Li Dion provokas, hom-ribelul'.
Martelas la pugno kontraŭ la pord'.
Sur mia piano rompiĝis kord'.

Por la 15a de decembro

Sopirantaj homoj, ĝemsopirantaj
Kiel bestoj fermitaj en kaĝojn, -
Iuj stomakkonsciaj pri peco da pano,
Aliaj pri paco, frateco revantaj,
Kreduloj pri vivo pli hela, pli bela, -
Indulgo, feliĉo, trankvilo, kaj varmo.

Junaj, maturaj, alt-aĝaj,
Ili pasis, pasadis, mortintojn
Adiaŭis, transprenis laborojn,
Esperis kaj agis, sinsekvis, kaj ĉesis.

Alvenis la fortaj, trumpetojn
Svingantaj, kun fanfaronado
Bruega, trudega, popolojn
Trompante, mokante, kaj humiligante.
Kaj kiam diskrevis maldaŭra potenco,
Vekiĝis unuopuloj
Kun alta konscienco,
Nur malfacile sin levis el buloj

Da disen blovitaj, de l' ŝtormo epoka
falĉitaj nuloj.

Unuopuloj kun krea poveco,
Vojpreparantoj al luma estonto,-
Pasis ili! ... Ĉu pasis?
Zamenhof – Lanti!

Restas pri ili, pioniroj homaraj,
Bildo de ekster la grego marŝantoj...
Vive memoru ni, dum niaj festoj,
Karajn portretojn.
Ligu kun sentoj fundan
Pripenson de kialo, neceso,
Havu konscion pri vojo kaj celo.

Memorŝarĝite
Paŝu ni supren, kun mens' en ribelo!

*(Recitata la 14an de decembro 1958
okaze de Zamenhofa bankedo de pariza
SAT-Rondo)*



L.L. Zamenhof



Lanti



OMAR KAJAM (OMAR KHAYYAM)



En filozofio, Omar Kajam partoprenis la grandan batalon, kiu estiĝis en la Persa Islamo de la 11a kaj 12a jarcentoj kaj en la Latina Kristanismo de la 12a kaj 13a jarcentoj, inter la helena sistemo de Aristotelo kaj la semidaj dogmoj de la Korano kaj de la Biblio: ĉu Dio estas pura senŝanĝa penso, aŭ sentohava miraklofara persono; ĉu la universo estas eterna, aŭ kreita; ĉu la animo sola estas senmorta, aŭ ĉu ankaŭ la korpo reviviĝos ktp. Influita de la granda Ibn Sina (kiun ni nomas Aviceno), Kajam inkliniĝis al la helenaj solvoj – kaj estis atakita de la islamaj ortodoksuloj kiel liberpensanto kaj ateisto.

La Robaioj

P 15

Kajam, se vin l' ebrio de vino vestas – ĝoju!
Se tulipvanga juno ĉe vi siestas – ĝoju!
Ne afliktiĝu, ke vi nenio estos morgaŭ:
Supozu vin senesta kaj, ĉar vi estas, – ĝoju!

P 31

Vi rompis la argilon de kruĉo, mia Mastro!
Kaj min elpelis el la feliĉ' orgia, Mastro!
En polvon Vi elverŝis mian rozpuran vinon:
Polviĝu mi! – ĉu estas Vi mem ebria, Mastro ?

P 33

Kiu do en ĉi mondo neniam pekis, Di' ?
Kiel do eblus vivi en senpekeca pi' ?
Mi malbonagis, kaj Vi min pagis per malbono:
Nu, kia diferenco inter mi mem kaj Vi?

El Vikipedio:

Omar Ĥajam, irana astronomo, matematikisto kaj poeto (1048-1122) naskiĝis en Neĝŝaburo en provinco Ĥorasano, Persio (nuna Irano). Kvankam ankaŭ al astronomio kaj matematiko li faris gravajn kontribuojn, tamen verŝajne sian famon tra la mondo Ĥajam pleje ŝuldas al siaj poemetoj verkitaĵ en formo de robaio.

Robaio estas persa kvarlinia poemo de la skemo $a a b a$ (aŭ $a a a a$). (...) En esperanton enkondukis ilin Gaston Waringhien.



FREDERI MISTRAL
(tradukis Valo)

La poemo de Rodano

Kanto Unua Mastro Apjan'



Eliros de Lion' je matenblanko
La veturistoj, reĝoj sur Rodano.
Estas de viroj raso nodmuskola,
La Kundriana, gaja, brava, ĉiam *
Stare sur flosoj kaj abiaj ŝipoj;
Brun' de sunhelo kaj rebril' de l' akvo
Orumas la vizaĝojn kiel bronzon.

Sed tiutempe pli ol nun, mi diras

Tie vidiĝas viregoj densbarbaj;
Korpulentoj, grandaj, kverke dikmembraj,
Movantaj foston kiel pajlereton,
De pob' al pru' krientaj, blasfemantaj,
Kaj, por kuraĝon al si doni, larĝe
El la poteg' trinkantaj ruĝan fluon
Aŭ el kaldron' ĉerpantaj karnotranĉojn.
Laŭlonge de l' river' kriado sonas
De vent' al vent' aŭdata senripoze:
- Pruon al val'! Reĝlanden! Imperien! **
Supren la pruo! Daŭ! Tiru la kablون! ***

* *Anoj de Kundrio (Condrieu), haveno sude ce Liono.*

** *Reĝlando, Imperio: dekstra (okcidenta), resp. maldekstra (orienta) bordo de Rodano.*

*** *Daŭ! okcitana interjekcio: Alten! ek!*

P.65

Tiam Vilhelm' diris: - Mi vin rekonas,
Ho Rodan-flor', sub l' akv' elvolviĝinta,
Flor' de feliĉ' en songo ekvidita,
Malgranda flor', bontrovita vi estu!
Ŝi en subita kuraĝo respondis:
- Mi vin rekonas, ho Drak'. Sub la akvo,
En via man' mi vidis butomfloron,

Kaj je la blonda barbet', blanka haŭto,
Verdaj okuloj sorĉaj, traborantaj,
Mi vidis, kiu vi... Al ŝi li donas
La floron, kaj, per mister' kunligitaj,
Ambaŭ ekstremas: ĉar l'amo rapidas
Sur la barko, kiu antaŭdestine,
Forportas ilin sur la riverfluo.

Al tiuj riveranoj kuraĝegaj,
Kiu sciis gardi siajn kutimojn,
Sian liberan havenon, kaj sian
Rodanon liberan. De tiuj patroj
Vigle falintaj en la batalado,
Se nun la filoj forgesis la gloron,
Des pli malbone por ili, la filoj!
Sed vi, la knaboj kiuj ĉiam savis
La Krion: Imperio! kiuj brave,
Senscie, baldaŭ, eble eĉ tre baldaŭ
Por ŝirmi Rodanon en ĝia vivo,
Estas riskontaj la lastan batalon,
Kun mi, fremdul', sed kiun surradias
Kaj ebriigas via lum' Rodana,
Levu la glasojn al l' afer' venkita!
Ektintis en la manoj ĉiuj glasoj.



JEAN-SEB

Baldaŭ printempo
Tago de la virinoj
Multaj belegas
Mi emas kuri al ili
Sed ve!
Mi ne plu havas kur-aĝon!



RUDYARD KIPLING

(el la angla tradukis L. A. kaj B. E. Long)

Se

Se povas vi pensadi kiam ĉiuj
ekfrezeziĝas kvazaŭ kulpa vi;
se vin mem fidi, ĉie malfidate,
sed kun toler' pri ĉies opini';
se povas vi senlace atendadi,
primensogate ne mensogas mem,
aŭ malamate, restas vi amanta,
sen tro da bonaspekt' aŭ saĝdirem';
se revu povas vi – ne tamen sklave;
se pensi – kaj pensaĵojn meti for;
se povas Malsukceson kaj Triumfon –
trompulojn – same trakti via kor';
se lasas vi friponoj aŭ simpluloj
la veron tordi kiun diris vi
vivcelojn povas vidi vi rompitaĵ,
kaj per uzitaj iloj fari pli:
se povas vi en unu hazardludo
de vi jam akiritan riski ĉion,
kaj perdi, kaj denove ekkomenci,
kaj pri la perdo ne eldiri ion;
se povas vi muskolon, nervon, koron,
jam eluzitajn, igi servi vin,
kaj tiel daŭrigadi la laboron
havante nur la Volon fari ĝin:
se povas vi babili ĉie – virta,
kun reĝoj promenadi – ne fiere,
se povas vundi nek malam' nek amo,
se ĉiu al vi gravas sed modere;
se povas en minuto mallasema
sesdeksekundan vojon kuri vi,
via la Tero estas, kun enhavo,
kaj plu – vi estas Viro, fil' de mi!



ARMAND SU

La bonkora faraono

Iam estis olda faraono,
Kun kompato vera kaj kor-bono.
Foje kun mirego li ekvidis
Sklavojn, kiuj sub la suno ŝvitis.
Kio l' oldulon tamen plej ĉagrenis
Estis, ke la sklavojn muŝoj ĝenis.
Sendis li ordonon, tujan, urĝan:
Ekde nun la kontrolistoj skurĝon
Portu, vipu ĉiujn muŝojn forte
Sur la sklavaj dorsoj, sed, ĝismorte.

Al la faraon' la sklavoj sendis
Delegitojn, kiuj ĉe li plendis:
Vipi ilin estas tro kruele,
Ili ja laboras jam anhele.
Tuj koleriĝis faraono,
Li ekkriis, per indigna tono:
«Havas via plend' nenian sencon,
Miskomprenas vi mian intencon:
Muŝojn celas mi mortigi pune -
Ili turmentadas vin subsune!».

Sendoma kato

Ĉasis vin la furioza ventpelo,
Kaj pluve malsekiĝis via felo.
Malsate kaj senespere vi ĝemis,
Kaj via korpet' febla tremis.
Vian etan vivon minacis la morto,
Senhelpe ploris vi ekster mia pordo.
Mi ĝin malfermis kun kompato,
Kaj vi eniris ŝtele, povra kato.
Por vi la manĝeton mi aranĝis,
Kaj ĉe l' varma forno vi manĝis.
Dormu trankvile, mia povra kato,
En mia hejm', ĉe l' nekonato.
Ne timu min, mi estas HOMO,
Kaj vin ne pelos el mia domo.

DANIELE CORBO
(Tradukis Elvezio)
Via kuraĝo

Se mi vian kuraĝon havus
monstrojn en vizaĝon rigardus
mi luktus eĉ en mallumo,
mi ne fuĝus de la batalo,
sed obstine al venko mi alstrebus.

Se mi vian kuraĝon havus
mi eliri el inferoj povus
mi retrorigardus neniam
kaj per mia spirita forto
ni ambaŭ la lumon revidos.

Se mi vian kuraĝon havus
nokto min ne timigus
en silentoj mi trovus konsentojn
mi konus la vojon ĉiam
sen timo senti min fora.



De: Miguel Fernández
Objet: Tutmonda Tago de la Poezio
Date: 21 mars 2020 à 12:17:39 UTC+1

Karaj geamikoj:

Amikino mia, bona hispana poetino, plusendis al mi hispanigon de poemo hipoteze verkita de iu Kitty O'Meary en la angla lingvo dum supozata epidemio de pesto en 1800. Rete mi konstatis, ke tiu poemo «viruse» disvastiĝis en Italio kaj disvastiĝadas en Hispanio, sen scio kaj supozo pri la identeco de Kitty O'Meary (aliaj nomas ŝin O'Meara). Iel aŭ alie, la granda sukceso de la poemo, ties kapablo kortuŝi homojn el diversaj mondopartoj kaj semi en ili esperon ĝuste en ĉi teruraj momentoj igis min pensi pri la oportuneco esperantigi ĝin por kunfesti kun vi ĉiuj la Tutmondan Tagon de la Poezio 2020. Sanon kaj poezion!

Kaj oni restis hejme.
Kaj legis librojn kaj aŭskultis.
Kaj ripozis kaj ekzerciĝis.
Kaj artumis kaj ludis.
Kaj lernis novajn estmanierojn.
Kaj haltis.
Kaj aŭskultis pli profunde...
Unu meditis.
Alia preĝis...
Tria dancis...
Kvara renkontiĝis kun sia ombro.
Ili komencis pensi alimaniere.

Kaj oni resaniĝis.
Kaj, en foresto de homoj vivantaj
sencie, danĝere,
sensence kaj senkore,
eĉ la Tero komencis resaniĝi.
Kaj, kiam finiĝis la danĝero
kaj la homoj denove renkontiĝis,
ili kune priploris la mortintojn.
Kaj alprenis novajn decidojn.
Kaj songis novajn bildojn.
Kaj kreis novajn vivo-formojn.
Kaj la Teron tute resanigis
kiel ili estis resanigitaj.

Kaj nun, jen miapluma poemeto dediĉita al la Poezio:

POEZIO

Ĉu Poezio estas vorta trompo?
Jes ja, Octavio Paz, sed ĝi, samtempe,
estas esprim' sublimes de frenezo.
Nia kara frenezo!
Sed neniam
nin oni resaĝigu!

Miguel Fernández

(Octavio Paz (pr. Oktavjo Pas') (1914-1998): Meksika poeto Nobel-premiita pri literaturo en 1990.)

Miguel Fernández



MESAĜO DE TRIGO (S-ro PENG Zhengming) , el WUHAN

la 2an de februaro 2020

La epidemio de Wuhan en Ĉinio ankoraŭ estas en grava stato: pli kaj pli da malsanuloj aperas (nur en Wuhan pli ol 4000, el ili pli ol 200 mortis...)

La tutlando batalas kontraŭ la viruso. Miloj da kuracistoj, medicinistoj kaj helpantoj, inkluzive de el la armeo venis/as al Wuhan kaj la regiono.

Oni en semajno elkonstruis la novan hospitalon kun 1600 litoj ĉe suda bordo de Jangzio, kaj la alia kun 1000 litoj ĉe la norda venos en uzo post morgaŭ...



Nova hospitalo de Wuhan

Mi mem kaj miaj familianoj, E-amikoj restas senprobleme. Do, per Ĉina Radio Internacia mi raportas al s-anoj:

[http://esperanto.cri.cn/2521/2020/02/03/162s209176.htm?
from=groupmessage&isappinstalled=0](http://esperanto.cri.cn/2521/2020/02/03/162s209176.htm?from=groupmessage&isappinstalled=0)

Dankon pro via atento!

via

Trigo/Lili

碰碰 2020/2/2 1:17:02

(Esperantisto Trigo de Wuhan en la Epidemio)

Ĉi tiu katastrofo (la plago ~ pneŭmonio kaŭzita de la nova korona viruso) venis tro subite, surprizis la popolon en Wuhan de Hubei provinco kaj la tutan Ĉinion.

Wuhan estas granda urbo ĉe Janzi-Rivero, kun 11 milionoj da loĝantaro kaj ĉirkaŭ 5 milionoj da moviĝantoj.

Mi estas Peng Zhengming (Esperanta nomo -Trigo), prezidanto de Hubei Esperanto -Asocio, kies oficejo troviĝas en Wuhan, kaj mi mem loĝas en Wuhan. Mi estas en epidemia regiono.

Mi rakontas iom el esperanta vidangulo.

Antaŭ la eksplodo (aŭ oficiale anoncita) de la evento niaj E-amikoj, sub la kadro de Esperanta Asocio, organizis kaj partoprenis diversajn agadojn rilate al Esperanto.

Ni havas Esperanto-instruan klason ĉiun mardon en Universitato Wuhan por Maljunuloj kaj ĉiumonatan kunvenon la duan sabaton de ĉiu monato.

En la tago de la regula kunveno de la 11a de ĉi tiu monato, tiam la mondo estis paca, kaj ne okazis "eksplodo". Mi devus iri al la antaŭurbo tagmeze por partopreni en la geedza ceremonio de iu amiko. Sed mi pli frue alvenis ankaŭ al la regula kunvenejo de la asocio (hotelo Hankou Changhang).

La samideanoj preparis la scenon de la printempa kunsido de la asocio, kaj ni babilis kune esperante dum iom da tempo antaŭ ol mi foriris.

Mi sekvis per WeChat la kunvenon kaj mi aŭdis, ke ĉiuj havas varman atendon kaj perspektivon pri la laboro de Esperanto en la nova jaro, kaj grupa ĥoro de Esperanto «Bonan Novjaron» tre kortuŝas ~~~ Esperanto-amikoj ĉiam estas pli sinceraj kaj viglaj ol aliaj partioj.

En la vendredo post tiu tago, ĉar la Esperanto-Asocio planis partopreni en helpo al malriĉuloj (postulite de la kompetenta aŭtoritato tiurilate), ĝenerala sekretariino Aroma (Wang Guiying) kaj mi ankaŭ vizitis relative pli malfacilan vilaĝon en iu antaŭurbo por helpi lokajn kamparanojn.

Oni traktis iujn fruktojn kaj legomojn sur la kampo. Tiutempe ni konsentis varbi membrojn por plue partopreni en ĉi tiu specifa agado... tuj post tiam la epidemio estis publikigita.

Ĉar Hubei Esperanto-Asocio baldaŭ okazigos sesio-ŝanĝon (reelekton) ĉi-jare, Aroma kaj mi ankaŭ vizitis iujn membrojn por aŭdi iliajn opiniojn pri la estonta laboro. La tri lokaj Esperanto-asocioj (Asocioj de urboj Huangshi, Wuhan kaj la Provinca) kunlaboras pli en Esperanto-agadoj en la lastaj jaroj.

Ni kunigis Esperantistojn por ne forgesi siajn originajn celojn, teni sian mision kaj centriĝi ĉirkaŭ laborplano de la lando.

La laboro komenciĝis kun bonaj rezultoj. La Provinca Asocio en la Tutlanda Esperanto-Kongreso okazinta lastatempe estis rekomendita kiel la Avangarda, kaj la provinca administra organo ankaŭ aprobis nian laboron per financado.

La tri asocioj kun granda decidemo kaj memfido, kaj bona divido de laboro kaj kunlaboro, sin preparis por la Jaro de la Rato (de la ĉina lunjaro).

Nun, batalo kontraŭ la epidemio estas ĉio!

Ekde la elirlimigado de la urbo Wuhan la 23-an de ĉi tiu monato, la hezitado en la antaŭa semajno kaj plistreĉiĝo kaj intensiĝo en la sekva semajno, en la lando ĉiuj subtenis la loĝantojn en Wuhan, Hubei-provinco. Ankaŭ la Esperanto-komunumo okupiĝas pri ĉi tiu batalo: resti hejme por ne infekti al aliaj - ankaŭ tiel kontribuas, kaj kontakti E-istojn per la interreto ankaŭ subtenas unu la alian. Ni ankaŭ uzas la specialan funkcion de Esperanto por rakonti al la mondo la veron de la batalo de nia nacio kontraŭ la epidemio.

Ĉar mi ofte vojaĝas en la Esperanto-rondo enlande kaj eksterlande, mi ricevis multajn salutojn de amikoj, mi respondis al ili unu post la alia, por ke miaj amikoj povu trankviliĝi kaj kredi, ke per diligenta laboro, scienca aranĝo kaj efikaj rimedoj por batali la epidemion, kiel ni faris iam dum la SARS-epidemio, inundoj, tertremoj kaj aliaj katastrofoj venkitaj en la pasinteco, ĉifoje la ĉina popolo, inkluzive de Wuhan-homoj certe venkos la batalon. Post la ŝtormo, ĉielarko aperos, kaj post vintro estos printempo! La homoj de Wuhan ne estas tre malproksimaj de la venkotago de epidemiaj krizoj, kaj baldaŭ venos la tago, kiam nia Esperantujo reunuiĝos kaj aktiviĝos! Koran Dankon!

PENG Zhengming (Trigo), ZHANG Li,
WANG Guiying, WANG Hong





Tiuj ĉi-sekvaj tekstoj de Annie Ernaux kaj Leïla Slimani fakte estas programeroj de France Inter, «Lettres d'intérieur» (*Elinternaj leteroj*) en la matena elsendo: ĉiutage, dum kelkaj minutoj, Augustin Trapenard legas «leteron» de verkist(in)o, de kiu li petis verki leteron al kiu ajn ŝi/li deziras, pri la temo, kiun ŝi/li libere elektas. Tio okazas pro la deviga izoliĝo, kiu malebligas «normalajn» elsendojn (kutime Trape-

nard animas kulturalan elsendon de la 9a ĝis la 10a kun invito, kiu rilatas al la kultura mondo). Tiujn leterojn tradukis Marcelo Redulez kaj Janine Dumoulin.

En pariza antaŭurbo, la 30an de marto 2020

S injoro Prezident',

«Mi skribas ĉi-leteron, kaj havas mi esperon, vi legu kun atent'». Al vi, kiu estas literaturerudito, tiu enkonduka aliro sendube elvokas ion. Temas pri komenco de la kanzono de Boris Vian *La dizertonto*, verkita en 1954, inter la milito en Hindaĉinio kaj tiu en Alĝerio. Hodiaŭ, kvankam vi tion proklamas, ni ne militas, la malamiko tie-ĉi estas ne homa, ne nia samulo, ĝi havas nek penson, nek volon noci, ignoras landlimojn kaj sociajn diferencojn, blinde multobligas saltante de individuo al alia. Armiloj, ĉar vi ŝatas tiun militan vortaron, estas litoj en hospitaloj, spirhelpiloj, maskoj kaj testiloj, estas la nombro de kuracistoj, sciencistoj kaj flegistoj. Tamen, ekde kiam vi regas Francion, vi restis surda al la alarmokrioj de la sanprofesiuloj kaj tio, kio legeblis sur banderolo dum manifestacio en lasta novembro – *la ŝtato kalkulas la groŝojn, ni kalkulos la mortintojn* – hodiaŭ eĥas tragike. Sed vi preferis aŭskulti tiujn, kiuj privilegias la ŝtatan malengaĝiĝon, rekomendas optimumigon de resursoj, reguligon de fluoj, tiun tutan ĵargonon nehomecan, kiu dissolvas la karnon de la realeco. Sed rigardu, estas la publikaj servoj, kiuj nuntempe plej grandparte funkciigas la landon: hospitaloj, Nacia edukado kaj ĝiaj miloj da tiel



malbone salajritaj geinstruistoj, elektroprovizado, poŝto, metrooj kaj fervojoj. Kaj tiuj, pri kiuj vi asertis, ke ili nenion valoras, ili, kiuj daŭrigas malplenigi la rubujojn, ĉe kaso pagigas la varojn, liveras picojn, garantias tiun vivon tiel nepran kiel la intelekta, la materian vivon.

Stranga elekto, tiu vorto «restarkapablo», signifanta rekonstruiĝo post traŭmato. Ni ankoraŭ ne atingis tiun punkton. Priatentu, Sinjoro Prezident', la konsekvencojn de tiu tempo kun deviga hejma restado, kun konfuzego de ordinara vivo. Jen tempo favora por pridubi. Tempo favora por deziri novan mondon. Ne la vian! Ne tiun, kie la decidantoj kaj la financistoj jam sen pudoro regurdas la antifonon «labori pli», ĝis dum 60 horoj semajne. Ni, multnombraj, ne plu volas tian mondon, kies evidentajn malegalecojn rivelas la epidemio. Ni, multnombraj, male volas tian mondon, kie la esencaj bezonoj, sin sane nutri, sin flegi, loĝi, sin eduki, esti kulturataj, estu garantiataj por ĉiuj, tian mondon, kies eblon ĝuste montras la aktualaj solidarecoj. Sciu, Sinjoro Prezident', ke ni ne plu lasos iun ajn ŝteli nian vivon, nur ĝin ni havas, kaj «nenio egalvaloras la vivon» - kanzono, denove, de Alain Souchon. Nek daŭre mutigi niajn demokratajn liberecojn, hodiaŭ limigitaj, libereco, kiu ebligas al mia letero, male al tiu de Boris Vian malpermesita je elsendo, esti legata hodiaŭ matene je ondoj de nacia radio.

Annie Ernaux



Annie Ernaux estas okdekjara franca literaturistino kaj fakinstruistino. Ŝia verkaro estas esence aŭtobiografia kaj ligita al sociologio.

Mi skribas al la enkarcerigitoj de la tuta mondo. Al la malliberuloj laŭ ordinaraj juro, al la enprizonigitoj pro politiko, al la bagnuloj, al tiuj, kiuj stagnoputras en ĉelo kaj ne scias kial. Mi skribas al la virinoj enklostrigitaj, sub vualoj aŭ inter muroj, al la virinoj al kiuj estas malpermesite eliri, miksiĝi kun la aliaj, tuŝi kaj esti tuŝata. Mi skribas al la frenezuloj, kiuj batas al si la kapon kontraŭ la murojn, kiuj remaĉas svagajn pensojn, kiuj ploras pro ĉagreno, kies nomon ili ne konas. Mi skribas al vi, kiuj vivas sub blokado, sur la stratoj de urboj en milito, en la teruro pro bomboj, pro atakoj, pro enfosado de via mondo. Mi skribas al la kuracistoj, kiuj kuracas en la subteraĵoj de Sirio infanojn frenezigitajn pro soleco kaj izoliĝo. Mi skribas al la tri milionoj da infanoj, kiuj mortas, ĉiujare, de malsato kaj de nia indiferento. Mi skribas al la rifuĝintoj de ĉiuj militoj, al tiuj, kiuj naskiĝis en amastendejoj kaj por kiuj la

mondo estas nur iu revo, iu fora loko, kiu rifuzas ilin. Tiuj amastendejoj, kie okazaraj infanoj tranĉas siajn vejnojn, ĉar futuro estas nur vorto, malplena je lumo kaj signifo. Mi skribas al tiuj, kiuj vivas enfermitaj inter dorndratoj kaj kontrolpunktoj, al la infanoj de Gazao, de Jemeno kaj de Venezuelo. Al tiuj, kiuj ne plu trovas skribilojn, ne plu kuracilojn, al tiuj, kiuj ne povas mildigi la malsatkriojn de siaj gefiloj. Mi skribas al tiuj, kiuj grandiĝas sub potenco, kiuj ilin dispremas, kiuj malpermesas al ili paroli kaj ridi, kaj por kiuj ĉiu tago havas nomon «teruro». Mi skribas al niaj gemaljunuloj, niaj pragepatroj, niaj saĝuloj, kiujn oni vidas kelkfoje vagadi sur la stratoj de Parizo, puŝantaj mezplenan rulkorbon. Ili havas flavajn harojn, grizan mienon, ili parolis al neniu de du tagoj kaj, je la kaso, ili ekkonversacias, surprizite je l' aŭdo de la sono de sia propra voĉo. Mi skribas al la vezikinfranoj, al la malsanuloj, al la kripluloj, kiuj konas la ekstreman solecon de la korpo, kiuj scias, ke estas suferoj, kiujn oni ne povas kunsperitigi. Suferoj, kiuj sin lokas en




mondo estas nur iu revo, iu fora loko, kiu rifuzas ilin. Tiuj amastendejoj, kie okazaraj infanoj tranĉas siajn vejnojn, ĉar futuro estas nur vorto, malplena je lumo kaj signifo. Mi skribas al tiuj, kiuj vivas enfermitaj inter dorndratoj kaj kontrolpunktoj, al la infanoj de Gazao, de Jemeno kaj de Venezuelo. Al tiuj, kiuj ne plu trovas skribilojn, ne plu kuracilojn, al tiuj, kiuj ne povas mildigi la malsatkriojn de siaj gefiloj. Mi skribas al tiuj, kiuj grandiĝas sub potenco, kiuj ilin dispremas, kiuj malpermesas al ili paroli kaj ridi, kaj por kiuj ĉiu tago havas nomon «teruro». Mi skribas al niaj gemaljunuloj, niaj pragepatroj, niaj saĝuloj, kiujn oni vidas kelkfoje vagadi sur la stratoj de Parizo, puŝantaj mezplenan rulkorbon. Ili havas flavajn harojn, grizan mienon, ili parolis al neniu de du tagoj kaj, je la kaso, ili ekkonversacias, surprizite je l' aŭdo de la sono de sia propra voĉo. Mi skribas al la vezikinfranoj, al la malsanuloj, al la kripluloj, kiuj konas la ekstreman solecon de la korpo, kiuj scias, ke estas suferoj, kiujn oni ne povas kunsperitigi. Suferoj, kiuj sin lokas en

la ostoj, en la sango, kiuj ronĝas niajn karnojn, kaj kiujn eĉ la amo de la aliaj ne povas mildigi. Mi skribas al la kadavroj, tiuj, kiuj putras en la maro de mia infanaĝo, tiuj, kiujn oni enterigas sub tombŝtonojn, kiuj surhavas nenies nomon, sur la plaĝojn de Kadizo, de Lesboso aŭ de Lampeduso. Mi skribas al la infanoj, kiujn oni metas en kaĝojn, je la landlimoj de la plej granda demokrati-lando kaj kiuj, dumnokte, serĉas la brakojn de siaj patrinaj. Mi skribas al la frapitaj virinoj, kiuj ĉiuvespere revenas al hejmo, kiel oni eniras en ĉelon, terurite de la provoso, kiu ilin atendas, kun la pugno fermita, kun la klabo je l' zono. Mi skribas al la vaguloj, al la trampo, al la virinoj kaj viroj, kiuj vivas sub la pluvo kaj la vento. Al tiuj, kiuj revas pri propra ĉambro, pri kvar muroj, pri pordo, kiun oni povus fermi. Pri loko, el kiu ili rajtus ne eliri kaj kien neniu rajtus eniri.

Leïla Slimani



Leïla Slimani estas marokafranca ĵurnalistino, verkistino, kiu ricevis literaturajn premiojn kaj politike engaĝiĝis kontraŭ integrismo, favore al samseksemuloj, kontraŭ ekstremaj partioj kaj favore al plurkulturalismo...



LA HOMARO ŜANCELITA KAJ LA SOCIO KOLAPSIGITA FAR MALGRANDA ETAĴO

Malgranda etaĵo nomita kronviruso perturbas la planedon. Io nevidebla alvenis por dikti sian leĝon. Ĝi dubigas pri ĉio kaj renversas la establitan ordon. Ĉio reordiĝas, alimaniere, malsame.

Kion la okcidentaj potencaj landoj ne sukcesis atingi en Sirio, en Libio, en Jemeno ktp. tiu malgranda etaĵo sukcesis atingi (pafĉesigon, portempan pacon ktp.).

Kion la alĝera armeo ne sukcesis atingi, tiu malgranda etaĵo sukcesis atingi (Hirako¹ ĉesis).

Kion ne sukcesis atingi la politikaj minoritatoj, tiu malgranda etaĵo sukcesis atingi (prokraston de balotoj ktp.).

Kion entreprenoj ne sukcesis atingi, tiu malgranda etaĵo sukcesis atingi (prokraston, malpezigon de impostpago, seninterezajn monpruntojn, investfondusojn, malaltigon de la kurzoj de la strategiaj krudmaterialoj, ktp.).

Kion Flavaveŝtuloj kaj sindikatoj ne sukcesis atingi, tiu malgranda etaĵo sukcesis atingi (malaltigon de la prezo de benzino, plifortigitan socian protekton, ktp.).

Subite, observeblas tra la okcidenta mondo, ke malaltiĝis la benzinkostoj, malaltiĝis poluado.

Homoj ekĝuis liberan tempon, tiom da libera tempo, ke ili eĉ ne plu scias, kion fari. Gepatroj lernas koni siajn infanojn, infanoj lernas restadi sine de familio, laboro ne plu estas ĉefa aktivaĵo, vojaĝoj kaj ŝatokupoj ne plu estas signoj de sukcesinta vivo. Subite, silente, ni turnas nin en nin mem kaj komprenas la valoron de la vortoj solidareco kaj malforteco.

Subite ni konscias, ke ni ĉiuj troviĝas sur sama ŝipo, riĉuloj kaj povruloj. Ni konscias, ke ni kune senhavigis la bretarojn de la magazenoj kaj kune konstatas, ke plenplenis hospitaloj kaj ke mono estas negrava. Ke ni ĉiuj egale homece frontas al kronviruso.

Ni konscias, ke en garaĝoj la altkvalitaj aŭtoj parkas nur ĉar neniu rajtas elveturi.

¹Hirak: traduko de la araba vorto signifanta Movado, signas serion da sporadaj manifestacioj, kiuj okazis ekde la 16a de februaro 2019 en Alĝerio por protesti kontraŭ kandidateco de Abdelaziz Buteflika al kvina prezidenteco.

Nur kelkaj tagoj sufiĉis al la universo por starigi socian egalecon, kiun ne eblis imagi. Timo invadis ĉiun. Ĝi ŝanĝis sian atakflankon. Ĝi forlasis la povrulojn por iri nesti ĉe riĉuloj kaj potenculoj. Ĝi memorigis al ili ilian malfortecon kaj rivelis ilian humanecon. Tio utilu al konsciigo pri la limo de la homa inteligenteco fronte al la forto de la naturo.

Nur kelkaj tagoj sufiĉis, por ke certeco iĝu malcerteco, forto iĝu malforto, povo iĝu solidareco kaj interkonsento.

Nur kelkaj tagoj sufiĉis, por ke Afriko iĝu fidinda kontinento. Ke menslogo iĝu mensogo.

Nur kelkaj tagoj sufiĉis, por ke homaro ekkonsciu, ke ĝi estas nur blovo kaj polvo.

Kiuj ni estas? Kion valoras ni? Kion povas ni kontraŭ kronviruso?

Ni akceptu evidentecon atendante providencon.

Pridemandu ni nian «humanecon» en tiu «tutmondiĝo» fronte al la kronvirusa sperto.

Restu ni hejme kaj meditu ni pri tiu pandemio.

Ni amu nin vivantajn!

Moustapha Dahleb (esperantigis Marcelo)



Moustapha Dahleb estas la aŭtora nomo de Doktoro Hassan Mahamat Idriss (doktoro pri Mastrumado-Sciencoj de la Universitato Jean-Moulin de Liono III en 2010). Li nuntempe estas agnoskita kiel unu el la plej valoraj ĉadaj verkistoj, kvankam li vivas en Francio de dudeko da jaroj. Li estas prezidanto de la Ĉambro pri Komerco kaj Industrio Francio-Ĉado.

Mezkvalita omaĝo al elstara artisto



La Kompanoj. *Brel en Esperanto*: KD – [s. l.]:
La Kompanoj, Duoble Unu, Vinilkosmo, 2018.

Oni ofte mencias kaj emfazas, ke Esperanto utilas kaj efikas kiel peranto de diverskulturaj valoroj, ke ĝi helpas konatiĝi kun alilingvaj kaj alikulturaj artaĵoj. Koncerne kantojn ni jam havas multajn bonajn ekzemplojn: diversnaciaj muzikaj grupoj tre digne kaj atentokapte prezentas al la tuta mondo la tradiciajn *popolajn* kantojn. Tamen la ekzemploj de Esperanto-prezentado de iuj pli-malpli modernaj artistoj malpli multas. De nun ni havas unu ekzemplon pli: temas pri la Esperanto-prezento de la mondfama franclingva kantisto Jacques Brel [Ĵak Brel].

Jacques Brel (Brelo) naskiĝis en 1929 apud Bruselo kaj mortis en 1978 apud Parizo. Li iĝis tre fama franc-lingva kantisto kaj aŭtoro, prezentanta la tradicion francan kanzon-ĝenron. Lia famo estis tiel granda, ke liaj kantoj sukcesis trapenetri eĉ la Feran Kurtenon: la kanto *Ne forlasu min* (Ne me quitte pas) rikoltis rimarkindan popularecon en Sovetio en traduka plenumo. La tekstoj de Brel estas sufiĉe diversaj teme kaj stile; temas ne nur pri amo, sed ankaŭ pri la aktiva kaj acida kritikado de la moderna socio. Liaj muzikoj plejparte estas ne tro melodiaj, sed la havata melodiececo (kune kun la riĉa akompano) estas ja sincera kaj kortuŝa. Certe, al la populareco de Brelo kontribuis ankaŭ lia aktora talento: li ne nur kantis, sed ankaŭ aktoris sur la scenejo.

La nun recenzata albumo estis preparita fare de *La Kompanoj*, iom neregula kunularo, kiu verŝajne plej konatas al la esperantistoj per la albumo *Survoje*, eldonita en 1999. Ĉi-foje ĉefrolis Fabrice Morandeaŭ kaj Pierre Bouvier, sed partoprenis ankaŭ aro da invititaj gastmuzikistoj. La provo mem prezenti la vastan gamon de Brelaj kreaĵoj en Esperanto ja estis laŭdifine malfacila kaj defia, do meritas aplaŭdon. Sed ve: laŭ mi, la partoprenintoj malgraŭ la verve malsukcesis transdoni la «spirito» de la originalaj kantoj (mi ja speciale

konatiĝis kun la originalaĵoj de Brelo por fari la komparon). Ĉi-okaze plejparte temas pri iom «hejmaj kaj ĉambraj» prezentoj kun la uzo de akordiono kaj gitaro; nur malofte aldoniĝas iuj kromaj muzikiloj (dum la originaĵoj de Brelo kutime riĉas je multinstrumenta akompano). La muzikoj do sonas iom malriĉe, foje eĉ iom plumpe. La kantistoj penis kompensi la mankon de muzik-bunto per iom da aktoremo, sed ankaŭ pri tio ili, laŭ mi, ne multe sukcesis. La kantoj ne sonas monotonaj, sed Brelo aŭskultata originale sukcesis prezenti siajn kantojn multe pli pasie kaj varie.

Ankaŭ la tradukoj de la tekstoj neniel ebligis al mi kompreni la belecon kaj riĉecon de la originalaj tekstoj (malgraŭ la svarmo de diversaj tradukistoj kaj lingvo-kontrolistoj). La tradukoj abundegas je stilaj malglataĵoj kaj “strangaj vortoj” (ekz. “bongustemaj”, dirate pri bombonoj) kaj neniel povas esti perceptataj kiel “glataj”. La meto de “ne” malantaŭ la negatan verbon (kiel en “Li celas al respekt’, sed ĝin ricevas ne”) jam iĝis treege teda en vinilkosmaj tradukoj el la franca. Tradicie aperas mislokitaĵoj akcentoj; la prononcoj estas plejparte bonaj, sed ne ĉiam. Kune kun la magra (kompare al la originalaĵoj!) muzika akompano la tuto akceptatas kiel nur mezkvalita omaĝo al tiel granda artisto, kiu estis Brelo.

La albumo tutcerte gratulindas kiel provo prezenti Brelon al la tutmonda esperantistaro. Min persone kaptis ega intereso pri Brelo kaj liaj kantoj dank’ al la albumo, espereble mi ne estos la sola “kaptito”. Sed, kiel oni scias, “grandaj defioj bezonas grandajn penojn”. Bedaŭrinde, ĉi albumo apenaŭ povas servi kiel digna prezento de Brelo en Esperanto, sed la funkcion de “populariganto” ĝi ja plenumas ege bone!

Paŭlo Mojajevo

Ĉi tiu recenzo aperis en la decembra numero de *La Ondo de Esperanto* (2019).



REAGOJ

Marcelo:

Laŭ mi tiu artikolo estas aperinda en estonta LEGI.

Mari-elen':

Kial ne? Tio ebligas respondi kaj diskuti laŭ raciaj (aŭ ne) argumentoj. Unue, kiu povas/rajtas pli bone traduki Brel, tiu faru! Due, poezio ĉiam ebligis ŝanĝi la tiel nomatan «normala» vortordon. Trie, kiel kompari unuflanke monpovan «industrian» produktadon kun orkestro, kaj duaflanke bonkvalitan memstaran

grupon, kiu dediĉis siajn kompetentojn kaj rimedojn al ellaborado de tuta disko? Kial esperanta kulturo nepre kopiu elitistajn ŝablonojn? Ekzistas elstaraj, minimume orkestrataj interpretadoj. Kion dirus la aŭtoro de tiu artikolo, pri solo-gitara interpretado? Nedubeble, tio ne plaĉus al li.

Tio starigas la ĉiaman demandon: ĉu interpretado nepre kopiu la originalon?

Povas okazi, ke oni, pro tute ne raciaj kialoj, ne ŝatos muzikon. Kio influas? Memoroj, antaŭaj impresoj, imago pri tio, kion oni atendas. Kial ne montri sin iom pli kuraĝa en sia artikolo, kaj konfesi, ke li ne tre ŝatas, sed ne kapablas diri kial laŭ realismaj argumentoj. Aŭ eble li konfesu, ke por kontentigi lin, nur Brel mem kantu siajn kanzonojn kun siaj muzikistoj.

Aldone, ĉar por tio restas nur unu tago laŭtradicie, mi deziras al vi bonegan jaron, kun sano, energio, ĝojo, komuna plezuroj, pliaj tradukoj/interpretadoj, plia kanta-do kaj muziko, kaj se iuj ne ŝatas tion, ili ne aŭskultu!

NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attendant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)

- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), Moline STRIDE (06 10 07 08 58)

- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)

- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)

- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46)

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a 30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

ABONKLUBO DE VINILKOMO

Vous souhaitez soutenir la musique en espéranto ?

C'est possible à partir de **10€ par an** !

Avec l'**ABONKLUBO**, vous pouvez choisir entre plusieurs formules d'abonnement vous permettant d'écouter en streaming toute la musique espérantiste en illimité ! Cet abonnement vous donne également accès à tous les labels indépendants présents sur la plateforme "Divercities Music".

Ce projet a été lancé par Vinilkosmo, label indépendant, principal label de musique espérantiste.

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/fr/vinilkosmo-abonklubo/abonnements-abonklubo.html>

Ĉu vi deziras subteni la Esperanto-muzikon?

Tio eblas ekde 10€ jare!

Kun la ABONKLUBO, vi povas elekti inter pluraj abonformuloj por aŭskulti elsendflue kaj sentemple la Esperanto-muzikon! Tiu abono ankaŭ permesas al vi aŭskulti ĉiujn sendependajn artistojn ĉe la platformo "Divercities Music" (Muzik-Diverseco).


Tiu projekto estis lanĉita de Vinilkosmo, sendependa eldonejo, ĉefa eldonejo de Esperanto-muziko.

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo/abonoj-abonklubo.html>



La eskapema kukumo

*Teksto de Oktavo Mirbo' (Octave Mirbeau)
tradukita de la Cenona Sesopo
(Martine, Monique, Klodin', André, Marcelo, Gloria)*



Delonge jam mi deziris mirindan planton, kiu nomiĝas Sylphium albyflorum. Vane mi ĉie petis ĝin de hortikulturistoj, kolektistoj, muzeoj, botanikaj ĝardenoj. Vane mi postulis ĝin de Angloj, Amerikanoj, Belgoj, kaj eĉ de tiu fervora kaj ĉarma botanikisto el Ĝenevo, S-ro H. Correvon, kiu kultivas en siaj kuriozaj ĝardenoj en Plainpalais ĉion, kion la universala floraro kapablas elmontri kiel belajn plantojn. Dum mi ĉagreniĝis pro senrezulto de miaj klopodoj, iu diris al mi:

- Konato mia eble havas vian planton. Li estas ia originalulo, tre amuza, kies dandeco estas posedi florojn, kiujn neniu alia posedas. Li laŭdire detenas eksterordinaraĵojn; vizitu lin. Li loĝas en Granville kaj laŭ kurioza fato lia nomo: Hortus.



La morgaŭon mi troviĝis en Granville. Mi trovis Ulĉjon Hortus en lia ĝardeno. Jen maljuna vireto, kun brunruĝa haŭto, neĝblanka hararo, kiu kun nudaj brakoj kaj tendoforma pajloĉapelo ludis korneton antaŭ hibisko.

- En ordo, mi kredas, diris li ekvidante min... Ĉifoje mi mastras tiun kanajlon...

Kaj ĉar mi perplekse mienis pro tiu akcepto, Ulĉjo Hortus klarigis:

- Jen... mi ŝatas nur plantojn, kiuj blagas... sed mi estas tiel spitema kiel ili... kaj mi incitetas ilin... Ĉu vi scias, kion mi ĵus faris? Mi ĵus fekundigis hibiskon... Hibisko malŝategas muzikon... Do, mi ludas korneton por ĝi, ĝuste je tempo por frukti. Tio ĝenas ĝin, tio perturbas ĝin... tio furiozigas ĝin... tio perdigas al ĝi la kandelon en la kapo... tial ĝi mise fekundiĝos, tio signifas, ke ĝi produktos semojn, el kiuj elkreskos iu komika monstro, kiu estos kvazaŭa hibisko, kiu estos tia planto, kian neniu jam vidis...



Mi vigle gratulis lin pro tiu kulturprocedo kaj mi klarigis al li la celon de mia vizito.

- Ĝin ne havas mi, respondis Ulĉjo Hortus... pli ĝuste ne scias mi, ĉu mi havas ĝin... ĉar mi havas multon da plantoj, kies nomon mi ne scias... tamen mi havas ion alian multe pli kurioza ol viaj karaj silfioj... la eskapeman kukumon... mi tuj montros ĝin al vi...

Kaj li invitis min, sekvi lin.

Daŭrigota



ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

